



VT 49- AOÛT 2021

la verda Triskelo

esperanto
Bretagne



2 numéros par an, parution :
Février - Octobre.

**Compte-rendu de
l'assemblée générale 2021
(vidu paĝon 3)**

**Diversaj rakontoj
de niaj membroj**

**Esperantaj spertoj
en
Greziljono kaj alie**

**Vidu
notindajn datojn 2021-2022
lastan paĝon**

Enhavo

• <i>Edito</i>	p. 2
• <i>Responsables de clubs</i>	p. 2
• <i>La Federacio</i>	p. 3
• <i>Armor-Esperanto</i>	p. 4,5
• <i>Poésie en esperanto</i>	p. 6,7
• <i>Retkunvenoj</i>	p. 8
• <i>Originalaj nomoj</i>	p. 9
• <i>Groto Chauvet</i>	p. 10
• <i>Eŭska lando</i>	p. 11
• <i>Libro de Gaby</i>	p. 12,13
• <i>Kastelo de Lamballe</i>	p. 14
• <i>Kie kantas la astakoj</i>	p. 15
• <i>Naskiĝo plena da surprizoj</i>	p. 16
• <i>BEMI semajno</i>	p. 17
• <i>En Grekio kun nia katino</i>	p. 18
• <i>Provludo en Greziljono</i>	p. 19
• <i>Farendaĵoj 2021-2022</i>	p. 20

Cotisation 2021

Pensez-y

Même si vous ne suivez pas de cours,
même si vous n'êtes pas actif,
soutenez l'Espéranto et restez informé.

Adressez-vous soit à votre correspondant
local si vous appartenez à un club, pour ad-
hérer à la fédération uniquement adressez-
vous à Xavier Godivier, coordonnées p.2.

Aux internautes
site Internet :

<http://bretonio..esperanto-france.org>

Pour vous inscrire à la liste de diffusion
Bretonio, et ainsi recevoir des nouvelles, plus
fraîches et plus nombreuses, envoyez un
message vide à l'adresse :

[bretonio-subscribe\[ce\]yahoogroupes.fr](mailto:bretonio-subscribe[ce]yahoogroupes.fr)

Redakcio : Jannick Huet-Schumann – 02.99.83.69.86 - [huet.jannick\[ce\]gmail.com](mailto:huet.jannick[ce]gmail.com) – 9 rue du Couradin - 35510 - Cesson-Sévigné

N'attendez pas la prochaine édition, envoyez vos articles dès maintenant pour les voir apparaître dans le prochain VT
(par courrier ou par courriel).

E D I T O

Post-pandemia Esperantio?

Malfacilas skribi pri la estonteco pro la nuna situacio kiu malfaciligas niajn kutimajn Esperanto-agadojn. Mi esperas ke ni estos multaj dum la membrokunveno, ĉu fizike ĉu per Interreto kaj telefono, por interŝanĝi kaj ĉefe diskuti ne pri la pasinteco sed pri kion fari por revigligi niajn asociojn post tiu malfacila periodo. Viaj ideoj, reagoj, petoj, proponoj estas bonvenaj por disdoni tra ĉiuj Esperanto-asocioj de Bretonio. Ĝis en Pluezek kaj aliloke en Esperantio!

Xavier Godivier

L'espéranto, après la pandémie ?

Il est difficile d'écrire sur l'avenir en ce moment à cause de la situation qui rend les activités habituelles de nos associations d'espéranto bien difficiles. J'espère que nous serons nombreux lors de l'assemblée générale que ce soit physiquement ou via Internet et téléphone pour échanger et discuter non pas du passé mais de ce que nous allons faire pour redynamiser nos associations après cette période difficile. Vos idées, réactions, demandes, propositions sont les bienvenues pour être diffusées auprès de toutes les associations d'espéranto de Bretagne. À bientôt à Plouézec et ailleurs

Xavier Godivier

Correspondants locaux

VT sendado	Manjo Clopeau	02.97.68.98.57	manjo.clopeau[ĉe]gamil.com ;
	12 rue de la Drisse 56450 Theix		
Armor-Esperanto (St Brieuc)	Alain Bournel	06.64.35.06.71	bournel.alain[ĉe]orange.fr
Hennebont	Yvette Veslin	02.97.36.08.75	yvette.veslin[ĉe]orange.fr
Lorient	Anne Georget	06.37.82.57.48	anne.georget[ĉe]wanadoo.fr
Plouézec	Jeanne Pouhaër	09.62.30.40.05	jeanne.pouhaer[ĉe]orange.fr
Guingamp	Anne Desormeaux	02.96.35.83.25	anne_desormeaux[ĉe]yahoo.fr
Lannion	Maja Mériaux	02.96.45.30.60	meriaux.family[ĉe]wanadoo.fr
Saint Quay Perros	Nicole Rizzoni		nicole.rizzoni[ĉe]wanadoo.fr
Vannes	Elinjo Le Dru	06.21.07.11.09	ledruelisabeth[ĉe]gmail.com
Rhuys	Francis Desmares	02.97.26.89.96	sicnarf56[ĉe]free.fr
Pontivy	Marielle Giraud	06.80.13.35.31	marielle.giraud[ĉe]gmail.com
Rennes	Xavier Godivier	09.53.17.02.55	zav[ĉe]esperanto-panorama.net
St Malo	A-Marie Argney	02.99.40.24.86	amargney[ĉe]wanadoo.fr
Pludaniel	Pierre Cardona	02.96.30.23.94	kortep[ĉe]gmail.com
Pleslin les grèves	Hélène Dubois	02.96.35.73.06	marbordo22[ĉe]yahoo.fr
Dinan-Ploubalay	Philippe Stride	06.76.29.90.11	philippe.stride[ĉe]wanadoo.fr
Montfort-sur-Meu	Josette Ducloyer	02.99.09.71.92	jpducloy[ĉe]club-internet.fr
Douarnenez	Chantal Allen	06.74.15.78.09	chantalallen9@gmail.com
Querrien	Françoise Noireau	06.09.12.03.74	desirdapprendre[ĉe]gmail.com
Herbignac	J-Y Santerre Duret	02.40.22.00.98	jys.mys[ĉe]club-internet.fr
Saint Aignan de Grand lieu	Solange Goan	02.40.31.02.56	sgoan[ĉe]club-internet.fr
Nantes	Lucette Echappé	02.40.04.46.02	lucette.lumeto[ĉe]laposte.net
St Nazaire	Chantal Barret	02.40.01.97.27	patchdomo[ĉe]yahoo.fr
Couëron	Luc Gouverneur	06.30.03.00.98	coueron-esperanto[ĉe]orange.fr

F e d e r a c i o

Compte-rendu de l'Assemblée Générale ordinaire

AG du dimanche 3 mai 2020 de 10h à 12h, suivi d'un programme convivial de 14h à 16h45

L'AG s'est tenue sur Internet à la fin de la période du premier confinement avec 23 participants.

Nous avons procédé à la présentation et approbation des rapports d'activités et financier (voir VT précédent), et à l'élection du tiers sortant : ont été candidats et réélus : Marielle Giraud, Amapola Triguéro, Jannick Huet-Schumann, Maryvonne Pennec, Denis-Serge Clopeau, Claude Bensimon, Laurent Peuch, nouvelle candidate et élue : Françoise Noireau.

Discussion et votes sur les propositions concernant la Maison Culturelle de l'espéranto : la fédération est donc désormais membre de la MCE par l'achat d'une part sociale (16 euros) et pourra à l'avenir contribuer à en augmenter le capital social par l'achat de parts B si sa trésorerie le permet notamment grâce à des dons. Voir le document présentant les propositions qui ont été approuvées pour plus de détail.

Au cours de l'AG le système de cotisation groupé avec Espéranto-France a été présenté suite à l'adhésion de Armor-Espéranto.

Cette AG virtuelle a été une occasion de se retrouver malgré le confinement pour partager la journée ensemble avec un programme de plusieurs présentations et échanges l'après-midi.

Nous espérons nous retrouver en « réel » lors de la prochaine AG prévue le 18 août à Plouézec !

Programme :

Matin AG de la FEB

- 9h30 Accueil et café
- 10h Mot du président
- 10h15 Approbation des rapports moral et financier
- 10h45 Élections de nouveaux membres aux CA
- 11h Projets de reprise des activités

De nouveaux membres sont les bienvenus au CA pour dynamiser les actions de la FEB après cette période d'endormissement général dont a été victime tout le secteur associatif !

- ☉ 12h-13h Repas (Pique-nique)

Après-midi, programme des Estivales de Plouézec :

- échanges en ligne avec des espérantistes du monde entier avec Fransoazo
- excursions avec Jeanne et Maryvonne
- expositions, jeux de société avec Noël, jeux de plein air
- intermèdes musicaux et bar
- service de librairie

15h Concert de Jomo

Proposition d'adhésion de la FEB à la maison culturelle de l'espéranto, château de Grésillon

Plusieurs membres de la fédération sont très actifs dans la Maison Culturelle de l'Espéranto (MCE) qui est située au château de Grésillon à Baugé-en-Anjou.

Le château est assez proche de notre région et joue depuis longtemps un rôle important pour les espérantistes bretons qui y passent souvent des vacances pour améliorer leur niveau d'espéranto, passer des examens et profiter des événements culturels qui y sont organisés. Au cours des dix dernières années, la MCE a retrouvé une augmentation de ses activités et de ses finances grâce à la location au public extérieur et à un programme plus complet avec au moins trois ou quatre semaines en été, une semaine en automne et une au printemps.

Première proposition: que la FEB devienne sociétaire en achetant une part sociale A de 16 euros. La MCE est une coopérative qui a besoin de ressources humaines et financières pour sa pérennité. À cette fin, nous proposons que la fédération devienne membre de la MCE, ce qui est possible non seulement pour les particuliers mais aussi pour les associations. Pour devenir membre, il suffit de payer une part A au prix de 16 euros. Cela donne la possibilité de participer à la réunion des membres de la MCE au nom de la FEB et de se présenter au nom de la FEB pour le comité qui gère la MCE. *Deuxième proposition:* la FEB pourra acheter à l'avenir des parts B de 200 euros. Si la première proposition est approuvée, nous proposons qu'à l'avenir la FEB puisse soutenir financièrement la MCE, en achetant des parts B de 200 euros pour augmenter le capital social de la MCE permettant de nouveaux travaux de rénovation pour augmenter les possibilités d'utilisation du lieu et préserver sa valeur. Nous proposons que l'achat de ces parts B puisse avoir lieu en cas de bénéfice de la FEB constaté à la fin de l'exercice comptable et après décision de l'assemblée des membres, **ou en cas de dons effectués par les membres à cet effet** après décision du comité. Précisons que si certains veulent aider financièrement directement la maison de la culture par un don, cela est possible mais la MCE étant une coopérative, elle est légalement considérée comme une entreprise et n'est pas habilitée à émettre des reçus fiscaux. En faisant un don à la FEB pour l'achat de parts B, les donateurs pourront recevoir un tel reçu donnant droit à réduction d'impôt. Cela permettra de contribuer davantage. Il convient également d'encourager les habitués du château de Grésillon à prendre une part active à son fonctionnement. Si vous y allez souvent, devenez sociétaire pour renforcer l'équipe qui fait vivre la MCE !

Rilate al interesocia kotizo

Armor Esperanto elektis la interesocian kotizon de Esperanto-France

Dum nia lasta fizika jarkunveno, sabaton la 15an de februaro 2020, la anoj de Armor Esperanto decidis (preskaŭ unanime) elekti la interesocian kotizon al Esperanto-France.

Kial tiu elekto ?

Kial aliĝi al Esperanto-France ?

Ni, esperantistoj, konscias, ke necesas fortigi la movadon por konigi Esperanton kaj ampleksi ĝian rekonon. Nu Esperanto-France ludas gravan rolon je tiu vidpunkto. Jen kelkaj el ĝiaj misioj kaj agadoj:

→ **informi la francajn kaj eŭropajn instituciojn kaj negoci kun ili.**

Ekzemple :E-o-France kontraktis kun la ministerio de Edukado por permesi la instruadon de la lingvo en mezlernejoj kaj liceoj

→ **regulaj kontaktoj kun la naciaj amaskomunikiloj**

→ **ĉeesto (budo, informiloj...)** dum gravaj eventoj (Fête de l'Humanité ktp)

→ **agnosko de la ministerio de Juneco por la akcepto de junuloj kadre de la Civita Servo, por okazigi trejnadojn por volontuloj ktp**

→ **Esperanto-France estas ankaŭ agnoskita kiel asocio de socia utilo ebligante redukton de imposto.**

→ **Ĝi ankaŭ havas servojn por siaj membroj kaj por la lokaj kluboj :**

- organizo de **rondvojaĝoj de eksterlandaj esperantistoj kaj de grupvojaĝoj okaze de la mondaj kongresoj**

- **librovendoservo**

- **vendo kostopreze de komunikiloj** : kalendaroj, kakemonoj, broŝuroj ktp

- eldono de pedagogia materialo por franclingvanoj : **Metodo 11** por komencantoj, **Metodo 12** por progresantoj, **ikurso.net** (reta ilo) ktp

- publikigo de trimestra gazeto : **le Monde de l'espéranto.**

→ **Esperanto-France ankaŭ sendas materialon al esperantistoj el malriĉaj landoj.**

Do vere utilis aliĝi al Esperanto-France, ĉu ne ? Des pli ke ĝi proponas malpli altan kotizon kadre de la interesocia kotizo : 20 € anstataŭ 39 € por anoj kiuj pagas impostojn kaj 10 € por tiuj kiuj ne pagas impostojn. Jam **18 lokaj asocioj** elektis la interesocian kotizon.

Do Armor Esperanto decidis apliki la interesocian kotizon tiamaniere, ke danke al la redukto de imposto, neniuj pagu pli ol antaŭe. Ekzemple, por individuo, (kies kotizoj estis antaŭe 20 € al Armor Esperanto kaj FEB + 39 € al Esperanto-France) la interesocia kotizo estas 50 € (20 € por E-o-France + 8 € por la FEB + 12 € por Armor Esperanto) sed fakte, post la redukto de imposto, la persono pagas nur 17 € .

Se iu klubo deziras pliajn informojn pri tio, ne hezitu kontakti min (ltpauch@hotmail.com aŭ 02 96 78 29 70)

Laurent Peuch (Saint-Brieuc)

PS: Mi aldonas, ke de la lasta FEB komitato kunveno, mi estas la delegito de la FEB en la Administra Konsilio de Esperanto-France. Do mi prezentos ties funkciadon en estonta VT.

Okazis kaj okazos

Malgraŭ la pandemio, studperiodo okazis en San Briego.

Dimanĉon la 18an de oktobro **dudeko da personoj partoprenis en la studperiodo** proponita de Armor Esperanto. Ĵeromo (el San Briego) ekinstruis Esperanton al 6 komencantoj kaj komencintoj, Ŝanjo (el Douarnenez) instruis al 3 progresantoj, kaj Lorento (el San Briego) paroligis kaj ludigis 6 progresantojn kaj babilantojn per teatraj ekzercoj kaj skeĉoj.

Alano, la prezidanto de Armor Esperanto, sekurigis la respekton de la sanaj reguloj. Dank'al la favora vetero, ni povis teatrumi kaj tagmanĝi ekstere.

Ĉiuj pasigis belan tagon.

Laurent Peuch

Esperantaj Someraj Tagoj de Pluezek

La 16-17-18-ajn de aŭgusto, Armor Esperanto kaj Pluezek Esperanto invitas vin trovi la esperantan pluezekan etoson post pli ol unu jaro sen fizika esperanta aranĝo.



Jen la ĉiutaga programo de la 14a ĝis la 19a en la renovigita festsalono:

- retinterŝanĝoj kun esperantistoj de la tuta mondo kun Fransoazo
- ekskursoj kun Jeanne kaj Maryvonne
- ekspozicioj, tabloludoj kun Noël, eksteraj ludoj
- muzikaj intermezoj kaj trinkejo
- Libroservo

Legu la detalajn informojn sur la tabulo en la halo.

La du koncertoj de JoMo :

- mardon la 17an je la **20a 30**
- merkredon la 18an je la **15a 00**.

La jarkunveno de la FEB :

merkredon la 18an je la **10a 00**.



Se vi bezonas informojn aŭ helpon

Noël 07 83 10 83 68 - Laurent : 06 89 86 12 97

Chanson et poésie en espéranto

Printempe de la jaro **2020**, mi estis invitita de la mediateko de Servon-sur-Vilaine por prelegi pri esperanto kadre de la printempo de la poetoj.

Mi zorge preparis la aferon, sed ve! Pro la Viruso la prelego estis nuligita.

Aŭtune, la responsuloj de la mediateko denove petis de mi prelegon, sed al alia publiko: plenkreskuloj pli malpli aĝaj, kun ĝenerala informo pri esperanto.

Do, mi elmetis la parton pri poezio kaj prelegis al nur 10 personoj, la maksimumo permesita de la urbestro en la salono, sed personoj ege interesataj, kun multaj demandoj.

Tamen, por ke mia laboro pri kanzonoj kaj poezio ne estu perdita, mi proponas ĝin al vi. Fine vi povos legi poemeton kiun mi verkis por klarigi kaj ilustru miajn klarigojn. Al viaj lernantoj, donu nur la vortojn por ke ili mem imagu poemeton!

Josette

Chanson et poésie en espéranto

Avec son **accent tonique sur l'avant-dernière syllabe**, la langue espéranto se prête vraiment bien à la **chanson et à la poésie**.

Il y a des **règles pour la poésie en espéranto** :

- les **rimes** sont faites sur le **temps fort**, qui se trouve sur l'accent tonique, donc **sur l'avant-dernière syllabe** quand le vers se termine par une voyelle.
- On peut, pour les besoins de la versification, faire une **élision**, avec des règles très strictes : seulement celle de la terminaison **o du nom** ou celle du **a de l'article la** : on remplace alors la voyelle supprimée par une apostrophe, on le verra avec une chanson tout à l'heure.
- Il faut tenir compte du **rythme** de la phrase en fonction de l'accent tonique de chaque mot, pour que la strophe soit harmonieuse.

Zamenhof était lui-même poète et a tout de suite écrit des poèmes avec sa langue, et aussi traduit des poèmes étrangers, aussi bien de Goethe que de Pouchkine par exemple.

Exemple dans son poème « la vojo », le Chemin, écrit en 1896, il dit :

<p>« Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante Ni iru la vojon celitan ! Eĉ guto malgranda, konstante frapante, Traboras la monton granitan...</p>	<p>C'est tout droit, courageusement et (sans pas de côté) sans hésitation que nous devons aller vers notre but ! Même une petite goutte, en frappant constamment, Traverse la montagne de granit...</p>
---	---

Cela ressemble beaucoup à la légende du colibri ! A remarquer : rimes croisées, effet de frappe

Exemples de proverbes :

Aprila vetero, trompa aero : temps d'avril, air qui trompe.

Printempo semas, aŭtuno rikoltas : la printemps sème, l'automne récolte

Ĉiu sezono kun sia bono : chaque saison a du bon

*Remarque : Le label **Vinilkosmo** <https://www.vinilkosmo-mp3.com/fr/>*

est spécialisé dans la production, l'édition et la distribution des musiques et chansons en espéranto

Chanson et poésie en espéranto (suite)

Exemples de chanson :

1) PRINTEMPAS chanson du groupe Akordo, traduction d'un poème de Thomas Morley (1557-1603)

“The First Booke of balets, 1595 , à écouter sur youtube :

<https://www.youtube.com/watch?v=hOzLodqK9dc>

On a fabriqué des verbes : printempas = c'est le printemps, majas = c'est le mois de mai.

Printempas kiam majas	C'est le printemps quand c'est le mois de mai
Ludantaj knaboj gajas	Des garçons qui jouent sont gais
Kun inoj sur herbej'	Avec des filles sur le pré
Ĉar nun ĝi verdas plej	Car c'est maintenant que le pré est le plus vert

2) Himno de la Tero (Hymne de la Terre)

Chanson qui sera chantée par mille choristes Place du Parlement à Rennes dans le cadre du congrès mondial de l'agriculture bio qui aura lieu au Couvent des Jacobins

<https://www.youtube.com/watch?v=H74q3k8NSi8>

Am' glor' pac' kaj ĝojo en nia anim' kaj kor', la birdoj de l' feliĉ' alportos la esperon de mondo pli bona sur Ter'. Pluv' de steloj en la ĉiel', eterna rigardo, la kant' de l'harmoni', rideto al la viv', la man' de infan' pura kaj sen- kulpa. Verec', unuec', liberec'. Paradizo sur la Ter', la glor' por l'Univers', ammesaĝo por nia idar', esperemo.	Amour, gloire, paix et joie dans notre âme et notre cœur, les oiseaux du bonheur apporteront l'espoir d'un monde meilleur sur Terre. Une pluie d'étoiles dans le ciel, regard éternel, le chant de l'harmonie, sourire à la vie, la main d'un enfant pur et innocent. Vérité, unité, liberté. Paradis sur la Terre, la gloire pour l'Univers, message d'amour pour nos enfants, espérance.
--	---

Avec les mots qui suivent (traductions à donner!), nous allons tenter d'écrire un poème en espéranto!

Printempo Tempo Primolo Kukolo Arbaro Kamparo Floro oro Vojo ĝojo Ulekso genesto Herbo Folio

Feliĉo Amo Sezono

Verda Flava Bela Gaja Ĝoja juna

Esti Flori Verdi Verdiĝi Aperi Alveni

Por Jen La En tute

*Alvenas l'printempo
Por amo la tempo
Floras la flava primolo
Kantas la gaja kukolo
Verdiĝas herbo en kamparo
Folioj junaj en arbaro
Jen ulekso aŭ genesto floro
Tute flava kiel brila oro
Jen aperas la ĝojo
Al feliĉo la vojo*

Josette

Retkunvenoj

Esperantaj retkunvenoj : taŭga solvo dum pandemio.



Ekde la 1a trudizoliĝo en marto 2020, haltis la kurso kiun mi gvidis en San Briego. Tiam 3 progresantoj partoprenis en la kurso en la MJC. Post 2/3 semajnoj, mi decidis provi okazigi retkurson per Zoom. Du el miaj lernantoj deziris partopreni. Mi do programis retkunvenon kaj proponis ĝin al kelkaj aliaj izolitaj esperantistoj. Tiel, tri retkunvenoj okazis inter aprilo kaj la fino de junio kun 6/7 personoj. En du el ili ni interŝanĝis kun eksterlandanoj : Carlo Spinola pri Andaluzio kaj Rainer Kurtz pri incendioj en Aŭstralio.

Ĉar la retkunvenoj, post kelkaj malfacilaĵoj, sufiĉe bone funkciis, ni kune decidis daŭrigi post la someraj ferioj po unu fojon monate. Tiel, ok retkunvenoj okazis dum tiu lernojarro kun 7/8 partoprenantoj je malsamaj niveloj .

Por ebligi al ĉiuj paroli, ni decidis la jenan organizon :

- ĉiu persono elektas temon kaj verkas tekston
- ĉiu sendas al mi la tekston por korekto
- ĉiu sendas la korektitan version al la aliaj partoprenantoj por faciligi la komprenon kaj prepari demandojn pri la temo
- dum la retinterŝanĝo, ĉiu prezentas sian temon dum 5 minutoj kaj poste respondas al demandoj dum 5 minutoj.

Dank'al la retkunvenoj, ni povis interŝanĝi pri multaj malsamaj temoj (pri historio, geografio, sociaj aferoj, ŝatokupoj ktp), provante bone kaj korekte paroli la lingvon. Tiel, ni praktikis E-on malgraŭ la trudizoliĝo kaj la halto de la kursoj en la kutimaj lokoj.

Pro la pozitiva taksado de la eksperimento, ni decidis daŭrigi la retkunvenojn dum la venonta lernojarro eĉ post la malfermo de la kursejoj.

En la nuna numero de la Verda Triskelo, vi povas legi artikolojn eltiritajn de la retkunvenoj.

Bonan legadon.

PS Mi deziras dankegi Xavier G. la prezidanto de la FEB, kiu permesis al ni uzi sian propran abonon al Zoom.

Laurent Peuch (San Briego)

Originalaj nomoj

Nuntempe esperanto estas moda por nomi novaĵojn, sed uzitaj de neesperantistoj ofte la vortoj estas malveraj aŭ almenaŭ neprecizaj.

Mi malkovris, ke tradicia panfaristo, kiu loĝas en Carentoir (56) kaj vendas siajn panojn kaj kukojn en mezepokaj festoj, nomas “kuko” sian brioĉon kun sekaj vinberoj. Fakte li ne konas esperanton sed trovis tiun vorton bela kaj adoptis ĝin. Li povus nomi ĝin pli bone “brioĉo” sed la “ĉ” estas por li stranga litero, do li preferis “kuko”.

Eble vi legis tion: En speciala magazino Ouest-France pri “la maro nia futuro” p15, oni ĝuste verkis pri ekspedicio “Unu Mondo” sed en la ĵurnalo Ouest-France de la 5^a de oktobro 2020 (en rubriko "Maro") ĉiufoje, en la titolo kaj en la artikolo mem, la ĵurnalisto erare skribis “Unu Mondo” anstataŭ "Mondo" kvankam klarigante ke temas pri esperanto vorto.... Sed la ĉefa afero estas, ke oni elektis esperanto- vorton....



La 5 partoprenantoj al tiu ekspedicio estis en Lorient kadre de la Festivalo pri maraj aventuristoj de merkredo 7a ĝis lundo 12a de oktobro. Mi demandis al la klubo de Hennebont kaj Lorient ĉu iu (j) povus viziti ilin. Claude kaj Loes Bensimon sukcesis kaj jen la raporto de Claude:

“Pasintan dimanĉon, Loes kaj mi vizitis la festivalon pri maraj aventuristoj en Lorient, kaj renkontis Tobias, la kunulo de Sophie (Sofi), la iniciatintoj de la ekspedicio "Unu mondo". Mi demandis al li

la kialon de tiu esperanta nomo de ilia ekspedicio. Li diris al mi unue, ke li jam havis antaŭe velŝipon nomita de li "Unu mondo". Ŝajnas ke li vendis ĝin. Li elektis tiun nomon, sen paroli esperanton (nek sia kunulinon Sophie) ĉar ili konsideras ke ni vivas en unu nura mondo, kies partoj estas ligitaj per la oceanoj. Pro tio ili nomigis la ekspedicion Nova Mondo. Ili volas atentigi la publikon pri la unueco de la mondo, kaj pri la vundebleco de la tuta natura medio, kie ajn oni poluas ĝin.

Ili ŝatus lerni esperanton, li diris, kaj li pensas ke Sophie ŝatus kaj povus facile lerni ĝin. Mankas la tempo. Mi diris ke se ili iam venus en Lorient por kelka tempo, mi povus inicii ilin iomete pri esperanto.

Ili vendas botelojn da vino kies etikedo estas desegnita de amiko, kun desegno de ilia ŝipo sur la etikedo, kaj kies nomo estas "Unu mondo"; Ni aĉetis unu, kies vino estis sufiĉe bongusta.

Ni interŝangis adresojn kaj telefonnumerojn.

Jen kelkaj fotoj de la ŝipo kaj de la renkonto.”

Gratulon al Claude kaj Loes!

Josette



La groto « Chauvet » - Pont d'Arc en Ardèche



Mi volas paroli pri prahistoria groto kiun mi vizitis antaŭ du jaroj en Ardèche, la groto «Chauvet» malkovrita en 1994 de tri speleologoj, Jean-Marie Chauvet, Eliette Brunel kaj Christian Hillaire, nomitaj « malkovristoj » . Tiu groto, klasigita en la « Monda Heredaĵo de Unesko », revoluciis la tutan teorion pri la naskiĝo kaj evolucio de la arto.

Ĝi estis fermita nature antaŭ 20 000 jaroj pro falo de ĝia enirejo. Tial povis konserviĝi sendifektaj spuroj de ĝia formacio, de la bestoj kaj homoj kiuj vizitis ĝin.

La pentraĵoj estas mirindaj, ofte bildigante movojn, kun ripetado de temoj. Ili estis pentritaj per lumo de graso.

Kvin cent mamutoj, felisoj, ĉevaloj, bizonoj, boacoj, uroj, unu pantero kaj unu otuso, ktp, kovras la murojn kaj ankaŭ troviĝas desegno de vulkana erupcio de vulkano de « Vivarais », antaŭ 36 000 jaroj.

Sed estas kopio kiun oni vizitas, ekzakta kopio. Lumo, temperaturo, odoro de ŝtonoj, paŝosignoj, kaj pentraĵoj, ĉio estas same refarita. La originala loko estis radiografita tridimensie, reproduktita je la milimetro betone kaj finita per mano. Artistoj kaj prahistoriistoj, refaris pentraĵojn per lignokarbo de ordinara pino samkiel la Aŭrignacioj.

Malgraŭ datado per karbono 14 je -36 000 jaroj, serĉistoj malkonsentas pri la aĝo de la pentraĵoj ĉar ili estas pli progresemaj ol en la Groto de Lascaux kiu datiĝas de -17 000 jaroj.

Je kelkaj kilometroj for situas la vera groto, fermita al la publiko kaj sub alta kontrolado. Serĉistoj daŭre kontrolas la kvaliton de la aero, la temperaturon de la tero, ktp... Ili moviĝas sur pontetoj.

Ĝi estas protektita samkiel trezoro !

Tiel dekoj da grotoj konservas spurojn de la prahistoriaj homoj. Multaj estas viziteblaj de la publiko : 28 en Francio. Sed multaj suferis pro detruantaj priserĉadoj, sed ĉiuj vidigas al ni tiun surrokan arton kies klarigo estas la sankta karaktero de la loko. En Francio, estas multe da grotoj en Aquitaine kaj Pireneoj .

A visiter : lafrancevuedesgrottes.fr

Andrea B. (Pleudaniel)

Ekskurso en eŭska lando



Mi pasigis unu semajnon en la eŭska lando por ekskursi. Ni estis deksep personoj de la ASPTT de San Briego, kiujn mi jam konis. Ni tranoktis triope en lignodomo en la kampadejo Rhune lokita en la vilaĝo Sare.

Lundon la 24-an de majo : ni ekskursis ĉirkaŭ la tipa turisma urbeto Espelette. Ekpluvego falis matene, sed ĝi haltis je la fino de la mateno antaŭ ol ni piknikis. En Espelette, ni povis vidi belajn blankajn eŭskajn domojn kun ruĝaj aŭ verdaj ligno-strukturoj la tagmanĝo en bonega restoracio lokita en Hispanio. La malsuprenirado estis malfacila antaŭ ol ni alvenis al la restoracio : mi estis laca.



Ĵaŭdon la 27-an de majo : ni marŝis dum la tuta tago sur la marbordo de Saint-Jean-de-Luz ĝis Hendayo. La vetero estis bonega kaj varma. La marbordo estis grandioza kaj la vidaĵoj al la haveno kaj al la urbo estis belegaj. Ni vidis, ke la terasoj de la trinkejoj estis plenplenaj. Tiam, ni transiris Ciboure kaj ni alvenis al la fortikaĵo de Socoa. Fine, ni piediris en la subarboj lokitaj en la areo de Arrabia kiu enhavis kastelon kaj grandan konstruaĵon apartenantan al la establokomitato de la

SNCF. Ni estis kontentaj meti la piedojn en la marakvon je la fino de la ekskurso.

Vendredon la 28-an de majo : ni plenumis la bravegaĵon de la semajno per marŝado de 1070 metroj da suprenirado. La unua grimpadado estis venkebla kaj mi ŝvitis abunde. Mi ofte devis trinki akvon kaj manĝeti por elteni. Ni piknikis ĉe la piedo de la montaro, tiam ni ekiris por grimpi al la supro de Iparla Pinto. Ni observis multajn vulturojn kiuj ŝvebis. Ni malfacile malsupreniris en la ŝtonpadojn. Mi vere tre soifis fine de la ekskurso.

Sabaton la 29-an de majo : ni komencis la piediradon en la urbeto Ainhao kun bela poetika nomo. Ni supreniris malgrandan grimpadon de kie ni povis ekvidi la supron de la montaroj, sur kiuj flosis nuboj. Ili aspektis kiel vulkanoj. Ni promenis sur la krucovojon. Poste, ni haltis antaŭ malgranda kapelo. Kontraŭe, tri grandaj krucoj stariĝis kun tiu de Kristo inter tiuj de la du ŝtelistoj. La nebulo malsupreniris laŭ nia direkto al la kapelo. La krucoj estis envolvitaj per blanka vualo. La loko fariĝis magia kaj mistera kiel en esotera filmo. Rekomencante la piediradon, iom pli for, ni ekvidis vulturon ripozantan sur roko. Ni alproksimiĝis al ĝi je malpli ol 10 metroj por foti ĝin. Ĝi restis tie stoika kaj ne forflugis tuj.

Ni faris belegajn ekskursojn dum la semajno kun relative suna vetero.

Por via informo, la eŭska lingvo estas primitiva lingvo parolita de la homoj de la neolitika periodo antaŭ 8 000 jaroj. Ĝi do ne estas hindo-eŭropa lingvo.

François V. (San Briego)

Paĝo 183 de la libro Gaby Tréanton, rakontoj pri mia vivo



Gaby en la ĝardeno de Munevera

La katido

Ni sidis sur herbo apud la kultura domo de *Gorazde*. Por miaj etaj lernantoj, mi verkis facilan poemeton akompanatan de desegnoj kaj de gestoj:

Orfa katido

En mia ĝardeno,
 apud mia domo,
 mi trovis katidon.
 La katido ploregis:
 Miaŭ! Miaŭ!
 Malfeliĉa katido.
 Kie estas via patrino,
 via patrino, bela katino?
 Kie estas via patro,
 via patro, la granda kato?
 Ilin vi perdis.
 Venu kun mi!

Paĝo 81 de la libro Gaby Tréanton, rakontoj pri mia vivo

Mia unua kongreso

Dum tiuj jaroj mi iris al kongresoj. La unua estis en Amsterdamo, eble en 1948. Mi havis korespondantinon en Roterdamo, kiu skribis al mi poŝtkarton, sed ŝia adreso estis nelegebla. Revenante el la kongreso mi haltis en Roterdamo por serĉi ŝin, sed neniu povis kompreni ŝian adreson. Homoj surstrate diris al mi: “Iru en tiun-ĉi domon, vi trovos esperantistojn”. Do mi iris, por informpeto. Anstataŭ kelkajn minutojn mi restis tie du tagojn! La paro estis korespondantoj de unu el miaj amikinoj, ili nomiĝis *Simon* kaj *Leena Stirman*. Poste mi longtempe korespondis kun ili, kiuj vere estis tre interesaj. *Simon* skribis kun multe da humuro kaj mi tre ŝatis liajn agrablajn leterojn. Ankaŭ ili venis al *Bréhat* por viziti min.



1948. Unua kongreso
en Amsterdamo

Ekskurso al insulo *Marken*



La historio de la eksa kastelo de Lamballe



La kastelo de Lamballe estis konstruita en la fino de la 10a jarcento, sur la plej alta parto de la urbo. Ĉirkaŭ la kastelo, la remparoj povis protekti la loĝantojn el 45 paroĥoj.

Tiu kastelo ne plu ekzistas ekde preskaŭ 4 jarcentoj, ĝi estis detruita du fojojn.

La kialo de la unua detruo

La duko de Bretonio, Johano la 3a, mortis en 1341, sen infano, sen nomi heredanton.

La franca reĝo Filipo la 6a nomumis duko de Bretonio Karolon de Blois, kies edzino estis nevino de la mortinta duko.

Tio malkontentigis Johanon de Montfort, kiu estis duonfrato de la mortinta duko, kaj pro tio ankaŭ volis fariĝi duko.

Okazis la heredeca milito de Bretonio, inter Karolo de Blois, kaj Johano de Montfort.

La subtenantoj de Johano de Monfort mortigis Karolon de Blois en 1364, dum la batalo de Auray. Tiam Johano de Monfort fariĝis duko kaj nomiĝis Johano la 4a, kaj post li, lia filo fariĝis Johano la 5a. La milito daŭris 23 jarojn.

Tiu milito okazis samtempe kiel la 100 jara milito : malfeliĉaj Bretonoj !

Pli ol kvin jardekoj poste, en la jaro 1420, la filoj de Karolo de Blois kaptis kaj malliberigis la dukon Johanon la 5an. Ili minacis mortigi lin.

Tio kolerigis la dukinon, kiu petis de la dukaj amikoj malkonstrui la kastelon de Lamballe.

La kastelo estis rekonstruita nur pli ol unu jarcento poste, en 1555.

La kialo de la dua kaj lasta detruo.

En 1626, Cezaro de Vendome regis Bretonion.

Li estis filo de la reĝo Henriko la 4a, sed ne filo de la reĝino : li estis peknaskita.

Li konspiris kontraŭ Richelieu kaj la reĝo Ludoviko la 13a.

Richelieu ne ŝatis tion !

Li malkonstruigis samtempe, la kastelojn de Lamballe, de Moncontour kaj de Guingamp !

Ekde tiu tempo, tiuj kasteloj ne estis rekonstruitaj. En Lamballe, hodiaŭ nur restas la kapelo de la kastelo, kiu nomiĝas « la kolegiejo ».

Tiu kapelo estis parto de la kastelfortikaĵoj.

Ĉar ĝi troviĝas sur la plej alta parto de la urbo, ni povas vidi ĝin de tre malproksime kaj viziti ĝin, sed nur somere, kiam la flago flagras supre.

Novaj bluaj kaj flavaj vitraloj anstataŭas tiujn de la mezepoko.

Oni perdis la kanvasojn de la kastelo.

Hodiaŭ, neniu plu scias kie situas la kastelfundamentoj.



Nur restas la kapelo de la kastelo

Jean-Yves Jegou (San Briego

Kie kantas la astakoj



Mi deziras paroli al vi pri tiu libro « Kie kantas la astakoj » de juna usona verkistino : Delia Owens.

La rakonto komencas dum la jaroj 1950, en grandaj marĉoj de Norda Karolino, en USN.

Tiuj marĉoj fakte estas la plejgrava rolanto de tiu libro.

Tie loĝas knabino, sola ekde siaj 10 jaroj, ĉar la membroj de ŝia familio unu post la alia forlasis la marĉojn. La lasta, kiu foriris estis la patro, stulta kaj ebria ulo.

Kya, la knabino, provas postvivi per si mem. Ŝi fiŝkaptas, kolektas mitulojn, manĝas sovaĝajn herbojn.

Ŝi scias, kiel stiri la boateton de la patro, sed ŝi bezonas benzinon por meti en ĝi. Apud la proksima urbo, oni trovas etan magazenon, tenitan de nigrolo, Norbert, la nura simpatia ulo rilate al Kya. Kiam li demandas pri la patro de Kya, ŝi ĉiam respondas, ke la patro estas hejme, sed Norbert komprenas, ke li abandonis ŝin. Li akceptas aĉeti al ŝi mitulojn por revendi, kontraŭ benzino.

Tiel iras la vivo. En la urbo, la rumoroj kuras pri la “knabino de la marĉoj”. La homoj ne aŭdacas iri ĝis ŝia dometo. En la komenco jes, la instruistino kaj iu sociala asistantino venis, sed Kya antaŭaŭdis ilin kaj kaŝis sin.

Kiam ŝi estas 13 aŭ 14 jaraĝa, ŝi renkontas knabon, Tate, kiu ofte venas fiŝkapti per boato en la marĉoj, kaj ili ekamikiĝas. Li instruas al ŝi kiel

legi kaj skribi, dum pluraj jaroj. Li pruntedonas al ŝi librojn, li malkovrigas al ŝi sciencojn kaj poezion, siajn du pasioj. Kaj li kuraĝigas ŝin pentri per akvarelo ĉion, kion ŝi observas ĉirkaŭ si. Ĉar ŝi havas kapablecon en tiu arto.

Sed iun tagon, li devas iri al universitato por daŭrigi siajn biologiajn studojn.

La soleco iĝas tiel peza, ke Kya ne sufiĉe malfidas alian knabon, kiu baldaŭ renkontas ŝin kaj promesas al ŝi belan futuron. Kaj iun tagon, tiu fraŭlo estas murdita. Do paralele al la unua rakonto, la verkistino forportas nin en enigmon ĉirkaŭ la murdo de tiu knabo, kiam Kya estis 22jara.

Mi ne diros plu al vi. Nur sciu, ke okazas proceso, oni akuzas ŝin esti la murdisto, finfine ŝi estas senkulpigita.

Kaj ŝi baldaŭ iĝas tre konata kaj respektita, ĉar, danke al Tate, ŝi sukcesas publikigi plurajn librojn pri la bestoj de la marĉoj, librojn kiuj ricevas grandan sukceson.

Tate revenas de la urbo kaj trovas laboron en scienca laboratorio de la regiono. Ĉio finiĝas bele, ĉar ili geedziĝas.

Ĝi estas precipe libro pri naturo : tra belegaj priskriboj, la verkistino informas nin pri la maniero, por Kya, trovi per si mem nutraĵojn kaj sekurecon, eĉ amikecon kaj amon meze de tiu sovaĝa regiono.

Maja

Naskiĝo plena da surprizoj...

La gefiloj kun sia knabo Felix loĝas je 800 kilometroj de Guingamp. Ili atendis naskiĝon de sia dua infano je fino de Julio. La gevoj planis ferii en la regiono de la gefiloj, ĉirkaŭ tiu epoko. La avo deziris foriri lundon la 20an de Julio, sed la avino proponis: « estus pli bone foriri vendredon la 17an, mi estas preta! ». Tiele li faris.

Kiam ili alvenis la vendredon sabate ĉe domo de la gefiloj, ĉio glatis. Ili haltis la ruldometon en ilian ĝardenon, kaj tre bone dormis en ĝi.

Morgaŭan matenon, Avino elruldometiĝis, por mantenmanĝi kun la gefiloj en la domo. Sed ili jam pretiĝis por iri al akuŝejo, ĉar la bebo anon-



ciĝis! Antaŭ ol foriri, la juna patrino bezonis neceson. Interne, ŝi subite kaj laŭte ekkris: « la bebo alvenas! »...

Ne paniku...

Avino prenis Felix-n en siajn brakojn kaj alportis lin al lia avo en la ruldometon. Ŝi rapide revenis en la domon. Ŝi vidis sian bofilinon sternitan sur la planko... kaj jam la kapon de la bebo. La patro alvokis la numeron 18, kiu alvokis la numeron 15.

Unue kaj rapide alvenis... la bebo. Memorante la gestojn de la akuŝistino, kiam naskiĝis Felix, la patro bone helpis. Li metis la bebon, kiu vikle ekkris, sur la ventron de la patrino.

Tre rapide iom poste alvenis la fajrobrigantistoj, sekvitaj de Samu-istoj. Ili prizorgis la bebon kaj la patrinon. Avino demandis: « kiu estas la bebo ». La patro respondis: « Lucien ».

Tiam la fajrobrigantistoj ŝoforis Lucien-n kaj lian patrinon al hospitalo.

Dua peco de tiu naskiĝo...

Antaŭ ol reiri kun ili en la akuŝejo de la malsanulejo, la patro prenis iom da tempo por spiritĉeestiĝi « Ĉio okazis tiel rapide... Ĉu ni songis? ».

Venante akuŝejen, li salutis la akuŝistinon. Ŝi antaŭdiris al li duan bonan emociion, kiam la patrino rakontos...

Tion la patrino rakontis al la patro: fakte, kiam flegistino zorgis pri Lucien, ŝi demandis « ĉu Lucien... aŭ Lucienne?? ». Dum la naskiĝo, la patro eraris pro la umbilika ŝnuro inter la kruroj de la bebo.

Tiel naskiĝis Jozefino, la 18an de Julio 2020. Be-la historio, ĉu ne? Plie, Jozefino estas la antaŭnomo de la baptopatrino de Avino.

Avino, klubanino de Guingamp

La bebo hodiaŭ!



BEMI semajno en Grésillon



Biciklado ĉirkaŭ Grésillon dum junio 2021

Unuan fojon, la asocio de esperantistaj biciklantoj BEMI, organizis biciklan semajnon en la KulturDomo de Grésillon. Ni estis 9 partoprenantoj, francoj, belgo, nederlandano, germanoj, hispano kato hundo!

Ĉiun tagon, ni celis viziton kaj Lars Sözüer kreis la itineron tra verdaj vojoj kaj malgrandaj stratoj.

La partoprenantoj aŭ kampadis aŭ dormis en la kromdomo. Ni piknikis tagmeze kaj preparis la vespermanĝojn kaj matenmanĝojn en la kuirejo de la kromdomo. Tiel eblis lui la kastelon dume.

Sunis kaj varmis dum la unuaj tagoj sed ni tute ne suferis ĉar ni biciklis sur verdaj vojoj sub arboj, perfekte! Poste pluvigis intertempe sed ni biciklis sur malgrandaj vojoj supre de montetoj kaj la pluvo ĉiam atendis ke ni haltis sub ŝirmiloj! Plie, ni ĝuis belajn panoramojn.

Esperanta etoso ĝojigis min, ĉiuj scipovis paroli esperante kaj Mathilde, la filino de Xavier bone parolis esperante dum la semajno ĉar necesis ĉu ne? por amikiĝi kun Ida, la juna nederlandanino.

La grupo ŝategis la viziton de la kastelo Montgeoffoy, kastelo de la 18-a jarcento kies aranĝo restis kiel estis origine kaj oni dum 10 jaroj renovigis la ŝtofojn.

Ne nur kasteloj allogis nin, ankaŭ naĝado en apuda lago bonvenis pro la varmego tiama!

BEMI okazigas semajnojn kaj karavanojn, tiel 4 personoj atingis Grésillon bicikle post pluraj tagoj de biciklado.... Kuraĝuloj... la « maljunulinoj » malpli kuraĝis kaj biciklis per elektraj bicikloj, tamen tre oportunaj por sekvi la junulojn!

Post tiu sukceso, BEMI organizos la sekvantan semajnon en Grésillon de la 18-a ĝis 25-a de oktobro 2021, okazos samtempe nia aŭtuna kantstaĝo

Jannick



En Grekio kun nia katino

« Ho Bihen! Ekkris nia filino. Vi alportas al ni donacon ?

Ho ! Rigardu ! Krabo ! Kaj sur nia lito ! »

Kaj, ĉiu vespere estis same. Bihen, nia katino, donacis al ni ion : sorikon, muson, krabeton...

Ni foriris el Malakoff (preskaŭ Parizo) unu monaton, aŭguste. Ni deziris viziti Grekion, ĝis kret-insulo (en septembro, Grekio estos en gymnaziprogramo de Dominique, nia filino). Ni, kaj Dominique, Frederique, Pascale, niaj tri filinoj, kaj Bihen, nia katino, estis tre ĝojaj. Nia malnova kamioneto «Estafette », estis, dum unu monato, aranĝita por iĝi nia palaco kaj unue, bone vivi ene 30 tagojn.

Vespere, ni etendis grandan liton por pasi longan agrablan familian momenton (sunsubiras frue en aŭgusto). Por bone dormi, breto estis farita supre de ŝoforloko kaj ĝis kvazaŭ la duono de kamioneto, kaj la tri filinoj (12,10,7 jaraĝaj) dormis tie. Estis amuza, oni vidis nur elstarisitaj tri kapojn sur la rando de la bretejo, ĉar iliaj piedoj estis kaŝitaj en la antaŭo de la veturilo.

Ĉar la celo estis Grekio, ni rapide tra kaj transveturis Francion, Italion, eĉ Jugoslavion, sed laŭ longe de tiu bela lando, ni devis ripozi ĉiu vespere, kaj Bihen komencis tie sian amuzan laŭriton. Problemo povas esti en Albanilandlimo ? Ni estis timantaj. Jes, komprenu ! La katino ne rajtis pasi.

Do, ni diris al ŝi : « ATENTU BIHEN ! Kiam doganisto venos, restu kaŝita ! ne movu ! ne miaŭu ! »


Kaj poste : « Brave Bihen, ni povas daŭrigi la vojaĝon ». Bihen estis tre inteligenta: tial, ĉiu vespere, ŝi saltis el la veturilo, kaj ĉiu matene, ŝi eniris ĝin, la okuloj dirante : « nun, ni povas iri, mi estas preta por novtago ». Jen, ni stariĝis en Grekio : kompreneble, rekten kaj unue Aten-arkeologion.

Ĉar antaŭe, ni rigardis reklamilojn, la loko multe interesis nin. Sed paroli ? krom gestojn, ni ne povis. Same, en unu (nia sola) restoracio. Esperanton ni ne sciis ! Do, ni restis precipe marborde, ĉiu ves-

pere. Pli praktike por la infanoj kaj...kaj... por Bihen. Survoje, ĉie ni trovis fruktojn : multajn figojn, hum ! Kaj eĉ opuntiojn (figues de Barbarie). Kaj, antaŭ la maro, la tuta familio bone ripozis : Tie, mia edzo kaptis fiŝojn, subakvon serĉante (mi ankoraŭ ne konis vegetalmangajaĵon!) por la plezuro de ĉiuj, inkluzive de Bihen. Dominique, Frederique, Pascale banis sin en varma akvo kaj ni ludis. Bihen preparis sian riton kaj komencis serĉi aŭ ĉasi por si kaj por la donaco kiun ŝi faros al ni.

Kaj jen ni estas sur ŝipo ĝis Kret-insulo.

Tie, ni vizitis la faman palacon de Knosos. La fili-



noj iĝis arkeologistinoj momente : « kiel oni venigis akvon en la banĉambron de la reĝino 4000 jarojn antaŭe ? ». Ĉe la horizonto oni vidis (mi ne plus certas sed ni preparolis tion !) Egiption ! Ne estas tro malproksime ! kaj estos en alia gimnazioprogramo post unu jaro!!!

sed tie Bihen, vi ne povos veni. Bihen ŝatis marbordon. Eĉ se ŝi vivas en Malakoff, tamen ŝi sendube pensis: « mi estas unue Bretonino, marbordo estas mia »

Nikol por klubo/kurso de Maja Nov 2020

Provludo en Greziljono

Tio, kio plej ĝojigis min lastatempe estis la kunveno kun la koruso Interkant' en la kastelo Greziljono apud Angers.

Kutime, ni retrovas nin (proksimume 20 kantistoj) ĉiu-sesmonate por provludi kun nia ĥorestrino Zdravka. Pro la Covid, dum unu jaro preskaŭ nenio okazis. Tiun fojon, ni estis 15 kantistoj. La etoso estis varmega. Ni ĝojis denove vidi nin, babili (esperante kompreneble), kanti, amuziĝi, promeni.

Neniu el ni estis tro streĉita pro la viruso, ĉar plej multe estis vakcinitaj.

Despli ke, la unuan vesperon, Jimmy kaj Zdravka proponis desinfekti nin ĉiujn pere de bona viskia aperitivo : bretona viskio. Sendube efikega !!! Malfeliĉe ankaŭ efikega por memortruoj. Subite, meze de tiu ĝojega momento, Jannick memoris, ke si devis serĉi Laurent-n en Baugé per veturilo. Li antaŭ-anoncis, ke li alvenas per buso, sed li vidis neniun ĉe la bushaltejo, kaj komencis piediri longe de la verda vojo. Finfine, li varme estis akceptita dank' al glaso da viskio.

Bonegan momenton ankaŭ ni vivis, kiam ni festis la datrevenon de Denezza. Emociplena momento...

La kastelo estas granda. Ni aprezis havi lokon, esti nur kvar ĉe ĉiu tablo por la manĝoj (ne tro da bruo).

Kia ĝojo konstati, ke ĉiuj bone trapasis tiun strangan periodon, eĉ se ĝi ne estis ĉiam facila precipe por tiuj, kiuj laboras.

Delonge, mi tre ŝatas promeni en la ĉirkaŭaĵoj de la kastelo, du hektaroj aŭ pli da arbaro. Verda vojo laŭiras laŭ la bieno, kaj ĉiutage posttagmeze, kelkaj el ni piediris en unu direkto aŭ la alia. La vetero belis. Birdoj senĉese kantis, kaj mi provis rekoni iliajn kantojn pere de mia poŝtelefono (aplo Birdnet).

Hubert kaj mi revenis hejmen malstreĉitaj, plenaj da nova energio, dankemaj al ĉiuj tiuj karaj geamikoj, kiujn ni ege aprezis revidi post tiom da tempo.

Maja



Farendajoj notindaj en via kalendaro 2019-2020



JES 2021/'22
en Wittenberg
Germanio
<http://jes.pej.pl/eo/>

De la 28a de decembro 2021 ĝis la 4a de januaro 2022.

19-a Novjara Renkontiĝo (NR)
27-a de decembro ĝis 3-a de januaro
En Wiesbaden, Germanio.
« Komune festi la Novan Jaron »
<http://esperantoland.org/nr/index.shtml#nr>

Luminesk' 2021/22
2021-12-28 – 2022-01-03
Münster/Germanio
<https://www.esperanto.de/eo/luminesk-eo>



27 - 29 août 2021

14^e [Universités d'été](#) de EDE

19 - 25 octobre 2021

[Rencontre chorale](#) d'Interkant
Avec Zdravka Bojčeva

18 - 25 octobre 2021

3^e [Semaine BEMI](#)
de cyclistes espérantophones avec *Olivier Buisson*

25 octobre - 1 novembre 2021

10^e AŬTUNE, les vacances espéranto -
avec fête de Halloween. Cours d'espéranto
et activités.

28 décembre 2021 - 2 janvier 2022

Fête de fin d'année et GrésiVeillon,
le réVeillon de la St. Sylvestre avec bal cos-
tumé

22 - 30 avril 2022

11^e PRINTEMPaS
cours intensifs avec *Przemek Wierzbowski,*
Szilva Szabolcs, Christophe Chazarein, Ma-
riion Quenut.

30 avril - 4 mai 2022

Interkant, IFEF, AMO —>provizore

La 107-a Universala Kongreso de Esperanto

Montrealo



06– 13 aŭgusto 2022

<https://www.uea.org/kongresoj/>

Pluezekaj someraj tagoj

16 - 18 aŭgusto 2021